

# STARTO ★

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1975 5(51)



Skribu al Esperanto - rondeto Lindnerova strato Praha 8-Liben, Ĉeĥoslovakio, reklamas la suprasurskribo. Komence de septembro la Ĉa. televido elsendis triminutan programon pri tiu ĉi lerneja kolektivo gvidata de E. Urbanová.

## VSETÍN 1975

Český a slovenský esperantský svaz připravily tohoto roku svou další společnou akci: II. setkání českých a slovenských esperantistů ve Vsetíně (19. - 22. 9.). Více než 250 účastníků si díky dobré organizaci setkání odneslo nezapomenutelné dojmy. Uspořádání a náplň setkání bylo motivováno 30. výročím osvobození naší vlasti, vzpomínkou na padlé během války a pevným odhodláním důsledně pokračovat v boji za světový mír.

Setkání se zúčastnili oficiální hosté z Bulharska a Maďarska a dopisy je pozdravili předseda ČES Josef Vitek, který byl t.č. v Bulharsku, esperantisté sdružení v Kulturbundu NDR, Polský esperantský svaz a předseda MEM N. Aleksiev. Jako host byl uvítán člen předsednictva Kulturního domu Sklář, v němž se setkání konalo. Jednání zahájil krátkým projevem předseda Místní skupiny ve Vsetíně A. Berka.

Místopředseda ÚV ČES D. Kočvara ve svém projevu zdůvodnil, proč se esperantisté hlásí k mírové spolupráci, k úsilí po dorozumění a míru. Téměř osmdesátiletá pohnutá historie hnutí dokazuje, že esperantisté se ve své drtivé většině hlásili k pokrokovým myšlenkám. Výzva D. Kočvary, aby esperantisté ještě účinněji pomáhali při své práci ve svazu i v práci pro společnost, byla přijata s nadšeným potleskem.

Poté soudružka M. Turková z Plzně ve svém příspěvku k Mezinárodnímu roku ženy informovala o výsledcích konference OSN v Mexiku a poukázala na závažnost usnesení i aplikace závěrů pro esperantistky obou našich národních svazů.

Odpoledne bylo věnováno schůzím jednotlivých sekcí, na prvním místě konferenci sekce MEM, dále sekci technické, komisi mládeže a komisí zabývající se výzkumy v oblasti interlingvistiky.

Konference MEM vyslechla zprávu Výboru sekce, kterou přednesl jeho místopředseda dr. R. Horský. Zároveň schválila doplněk ve stanovách sekce o zřízení odborů křesťanských a katolických esperantistů a nový výbor sekce. Poté generální tajemník MEM D. Kočvara předal



Záběr ze slavnostního předání čestných odznaků a diplomů MEM. Zprava: D. Kočvara, A. Berka, dr. A. Berka, dr. R. Horský, F. Sedláček, J. Lička, ing. V. Kočvara, M. Jira, J. Hanzelka a B. Dvořák

čestné odznaky a diplomy MEM zasloužilým pracovníkům ČES.

Druhý den se všichni účastníci poklonili památce padlých v odboji a položili k jejich památníku věnec rudých květů.

Nelze se nezmínit o hodnotném kulturním večeru, laděném do komorního tonu. Vystoupil na něm ženský pěvecký soubor vedený K. Duřepkovou, který připravil několik písní v esperantu, přestože žádná z členek souboru tento jazyk neovládá. M. Smyčka zapíval se svou kolegyní z ústecké opery A. Farnou několik operních arií a připravili tak posluchačům nejhezčí zážitek večera.

Účastníci se rozcházeli s pocitem, že toto a podobná setkání mají rok od roku stoupající tendenci jak v organizaci, tak i svým obsahem a smyslem.

#### Ze zákulisí setkání...

Když se rozcházelo do svých domovů více než 250 účastníků vsetínského setkání, které bylo bezesporu dalším důkazem životnosti esperantského hnutí u nás, i důkazem, na jak vysoké úrovni u nás taková setkání probíhají, jen málokdo věděl, co všechno se muselo stát, aby setkání bylo právě takové, jaké bylo.

Protože jsem byl, vzhledem ke své funkci ve svazu, pověřen režii setkání, mchu říci, že bylo třeba vyřešit mnoho problémů. Setkání se připravovalo několik měsíců s tím, že vsetínská esperantistická se postarají hlavně o materiální zabezpečení. Bylo třeba vyrobit, instalovat a aranžovat výzdobu, která byla vkusná, i když jednoduchá. Bylo třeba zajistit noclehy, projednat způsob dopravy, stravování, pozvánky, program a mnoho dalších drobností. Byl vypracován režijní plán, jakýsi scénář s přesným vymezením časů a s nástupy, zasedacím pořádkem, projevy a časovými rezervami. Zástupci ústředních výborů českého a slovenského svazu, ing. V. Kočvara a ing. M. Zvara, byli pověřeni zajištěním programu kulturního večera.

A tak návštěvníci ani nezpozorovali závadu v programu, když několik hodin před zahájením setkání oznámil soubor Jasénka, že nebude vystupovat. Operativně se řešila náhrada, doprava potřebných materiálů, spojení apod.

Díky disciplinovanosti účastníků a obětavým lidem ze Vsetína i odjinud se podařilo dobré dílo. A mezi všemi se pohyboval zcela nenápadný, většinou lidí neznámý mladý esperantista, který právě ve dnech setkání oslavil první výročí svatby, byl režisérem, dělníkem, duší setkání, byl všude, kde bylo třeba. Dík jemu, stejně jako ostatním!

/kk/

MESAĜON por la 21a mondkonferenco kontraŭ A kaj H bomboj en Japanio sendis en la nomo de ĉiuj esperantistoj pacbatalantoj la ĝenerala sekretario de MEM Drahomír Kočvara. Kiel punkton de la konferenco rezolucio li proponis i. a. aplikon de Esperanto por la informado pri la rezultoj atingitaj en la batalo kontraŭ la nuklea malmarmigo.

KIU VENDOS "Fabeloj" de Andersen al s-ino M. Kuřevová: (Dlouhá 19, 415 Ol Teplice). Sendu poŝtpagilon.

LA PLEJ SINCERAJN DANKESPRI-MOJN de la vjetnama popolo pro la "valora subteno kaj helpo al la justa lukto por Vjetnamio paca, unueca, sendependa, demokracia kaj prospera" sendis al ĈEA Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

SESDEK PARTOPRENINTOJ de la Autuna Renkontiĝo de esperantistoj kun internacia partopreno en Marto (septembro 1975) sendis korajn salutojn al la estro de ĈEA kaj la legandoj de Starto.

## Vzorná akce herbortických

Ve dnech 12.-26. července 1975 uspořádala místní skupina ČES v Herbortících ve spolupráci s OB při MNV v Herbortících již 7. letní esperantský tábor. O jeho výsledcích nám referoval vedoucí tábora Miloslav Š v á - č e k :

Tábora se zúčastnilo celkem 72 osob, z toho jeden host z Maďarska, sedm z Polska a dva z NDR. Hlavní náplní byly opět kursy esperanta pod vedením J. Cinka, které měly dobrou úroveň.

V rámci oslav 30. výročí osvobození naší vlasti byla uskutečněna návštěva blízkého Ládku - památného místa protifašistického odboje. Výstup na památný vrch vedl zasloužilý člen VO KSC Josef Thun. Do programu byl zařazen také večer polských přátel, kteří u příležitosti oslav státního svátku PLR (22.7.) připravili pěkný program, vhodně doplněný hosty z NDR a Maďarska.

Účastníci tábora navázali kontakt s místní skupinou SSM v Herbortících a pořadatelé dohodli spolupráci při organizování příštího tábora. S místní skupinou SSM byl sehrán přátelský volejbalový zápas.

Účastníci byli dále informováni o Českém esperantském svazu, o jeho sekcích, zejména mírové (MEM). Všichni obdrželi propagační číslo časopisu PACO, jež věnoval Jan Tichý.

S táborníky se na závěr přišel rozloučit předseda MNV a OB v Herbortících, soudruh F. Severin, který přislíbil opětnou podporu místních složek.

Celkový průběh akce lze hodnotit velmi kladně a jako významný přínos našemu hnutí.

**SALUTOJN** el la 8-a Pupteatra Internacia Festivalo ricevis la prezidanto de ĈEA J. Vítek de vicprez. de AE SSM M. Zvara.

**BORSO EN PĹZENĚN.** Esperanto-Rondeto en Plzen preparos por esperantistoj borson de esperantistoj (inajnoj, glumarkoj, poŝtmarkoj, libroj ktp) la 14-an de decembro 1975, de la 8-a ĝis la 14-a horo, en ZK ROH, o. p. Skoda, Plzen, Kopecského sady 13 (Beseda). Venu ĉiuj kaj alportu viajn proprajn materialojn por interŝangi.

**KONKURSON** "Kion vi scias pri la urbo Plovdiv, ĝiaj historio kaj nuntempo" anoncas la Esperanto-societo KULTURO, p.k. 151, 4000 Plovdiv, Bulgario, omaĝe al la naskiĝtago de Zemenhof. Premioj: senpaga restado en Plovdiv dum la Internacia Foiro, partopreno en la Ora Feriado en Pamporovo. Skribu por demandiloj je la supre menciita adreso!

**AL LA SAMA DATO** (15. 12. 1975) organizas lettervesperon la KAG-Esperanto de Kulturbund, 83 Pirna, Elbe, GDR, Tischlerplatz 13. Bildkartojn kaj leterojn bv. filialele franki, ĉar post la lettervespero estas organizota Esperanto-ekspozicio. Gazetoj, libroj au broŝuroj estas ankaŭ bonvenaj.

**BONVOLULOJ**, sendu mankantajn n-rojn (3,4/1973 kaj 4/1974) de la Bulteno de EK Praha por Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno al P. Rak, sekretario de EKP, p. k. 1069, 111 21 Praha 1.

Sub la auspicio de Ministerio de kulturo okazis le 12an de oktobro en Mělník seminario por la funkciuloj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La partoprenantoj estis informitaj, KE FINE DE JANUARO AŬ KOMENCE DE FEBRUARO 1976 OKAZOS LA II-A KONGRESO DE ĈEA. Pluaj informoj sekvos en la venonta n-ro.

# MEM-peranto

Kunlaboro kun la nacia kaj internacia pacmovadoj devas esti la unuarange tasko de la esperantistaro en la socialismaj landoj. Pruvas tion ankau la tiurilataj kontraktoj inter Tutmonda Packonsilio kaj Mondpaca Esperantista Movado interkonsentitaj dum la Packongreso en Moskvo, 1973.

La neceso profundigi tiun ĉi kunlaboron en ĈSR, nome inter la Distriktaĵ Packonsilioj (DP) kaj Lokaj Grupoj de ĈEA, traktas i. a. la artikolo publikigita en la 3-a numero de Bulteno de Ĉs. Packomitato, en kiu oni rekomendas al DP akceptadi la helpon kaj kunlaboron de la esperantistoj.

Ĉiuj aktivuloj de MEM en ĈSR estas petataj ne preprofi ti de tiu ĉi artikolo.

Ĉar la bulteno estas eldonata en limigita kvanto, la koncerna numero povis esti sendita nur al kelkaj LG. Tamen ĝi troviĝas en ĉiuj sidejoj de Nacia Fronto kaj oni devas atentigi pri ĝi, se necese.

Lokaj Grupoj, informu nin pri la rezultoj!



**SPOLEČNÉ SETKÁNÍ** mladých esperantistů v rámci II. setkání ĈES a ZE SSR ve Vsetíně se konalo za účasti 40 mladých aktivistů obou svazů. Hostem byl předseda mládežnické organizace BEA D. Papazov. Cílem setkání bylo manifestační zahájení spolupráce mladých členů ĈES a ZE SSR a konkrétní příprava některých akcí. O práci Komise pro činnost mládeže ĈES informoval její předseda J. Víték ml., o práci mladých ve ZE SSR Ing. Hysko a D. Papazov o činnosti mladých esperantistů v BLR. Slovenští kolegové byli informováni rovněž o připravovaném vstupu obou organizací v ĈSSR do TEJO.

Na rok 1976 byly dohodnuty tyto společné akce:

XIII. seminář esp. mládeže v Lančově (květen)

Archeologická brigáda v BLR (červenec)

XIV. seminář esp. mládeže v Ostravě (září)

XII. seminář se bude konat ve dnech 7. - 9. 11. v autokempinku Mělničan a jeho hlavním tématem je práce v kroužcích a instrukce ze školení funkcionářů svazu.

V diskusí vystoupil mj. s velmi hodnotným příspěvkem A. Zachariáš z Košic, který informoval o zkušenostech tamního klubu.

**ZÁJEMCI O MEZINÁRODNÍ ESPERANTSKOU ARCHEOLOGICKOU BRIGÁDU** v Bulharsku (červenec 1976) napište, o bližší informace J. Hinčicovi, Sismáčkova 27, 700 00 Ostrava. Účastníci této 3týdenní brigády si hradí pouze cestovné tam a zpět. Z výtěžku práce je jim hrazena strava, ubytování a na závěr týdenní zájezd. Organizací společného zájezdu na brigádu zajišťuje Komise pro činnost mládeže ĈES.

**PANORAMO**, literatura almanako de Starto, aperigos en sia proksima n-ro (2/75) kronplekton de poem-tradukoj de J. Kofínek, fragmentojn el la romanoj Vitra monto de A. Bednár, Sildo kaj Glavo de B. Horat kaj Saturnin de Z. Jirotka, la du kantojn el Majo, la Ĉefverko de K. H. Mécha, originalan rakonton pri la mistera solstico kaj studon pri la literaturaĵ kritiko kaj historio en E-o.

## LA SCIENCTEKNIKA KARAKTERO DE ESPERANTO

La strukturo de Esperanto estas altmezure moderna, iasence rekte komputila kaj preskaŭ senlime kombinebla. Tiuj kvalitoj kaŭzas, ke Esperanto estas unu el la plej elastaj kaj esprimkapablaj lingvoj de la mondo, idiomu kun maksimuma grado de funkcieco, lingvo eksterordinare taŭga por la scienco kaj tekniko. Ĝiaj bazaj elementoj konsistigas perfektan mekanismon mirinde simplan, tamen ĝuste tial ekstreme agopovan, mekanismon, kiu kapablas registradi (kaj retrodonadi) laŭvolajn kvantegojn de plej diversaj informeroj, kiuj havas fantezian kombineblecon. Esence, tamen, ili restas ĉiam la samaj, kiel en la vortoj retr-o-don-ad-i, kvant-eg-o-j-n, en kiuj la bito -o ĉiam signifas nominativan substantivon singularan, la bito -j plurlon kaj la bito -n akuzativon. Ĉiukaze la interna, aglutina, preskaŭ kibernetara aranĝo de Esperanto estas io absolute unika kaj senpreceda. Ĝi predestinas Esperanton al la rolo de ekskluziva lingvo de la scienco kaj tekniko.

Eble tial ĉiuj novlatinaj projektoj kiel Occidental<sup>1)</sup> aŭ Interlingua impresas apud ĝi pli malpli kiel nuraj infanaj ludiloj. Kaj, fakte, ili estas ludiloj, eĉ ekmodaj kaj nemodernaj ludiloj, ĉar ludiloj bazitaj sur falsaj, hazardaj kaj tial profunde eraraj kaj absolute nesciencaj principoj kaj premisoj. La ĉefa zorgo kaj celo de Occidental kaj Interlingua estas la ekstera aspekto, la vesto, kiel ĉe virino. Occidental kaj Interlingua volas laŭeble plej multe simili al io. Ni allasu, ke vere ili iom similas al io, al la latina unuavice. Sed nur la latina similas al la latina tute kaj perfekte. Bedaŭrinde tio ja signifas konduki la demandon ĝis absurdo. Ĉar estas same kiel se la modernaj raketkonstruistoj estas starigintaj al si la premison, ke iliaj raketoj nepre devas simili al iuj mezo-zojkaj flugosauroj, al arkeopterigoj aŭ pterodaktiloj ekzemple!

Kontraŭe la ĉefa celo de Esperanto estas la funkcieco, t. e. la maksimuma kapablo plenumadi la funkciojn, al kiuj ĝi estas destinita: ne simili al io, sed mem esti io. Ĉu nur hazarde tio ja estas krome eĉ la ĉefa postulo de la racio kaj de la scienco?

La fizionomio de Interlingua estas elpruntita kaj fremda. La fizionomio de Esperanto estas aŭtenta kaj propra. Esperanto ne volas simili al io. Esperanto volas esti ĝi mem!

La argumentoj, entute ĉiuj sintenoj de okcidentalistoj kaj interlingvaistoj estas mezepokaj, t. e. misteraj kaj mistikaj. La argumentoj de esperantistoj estas raciaj, logikaj, realismaj kaj funkciaj. Por okcidentalistoj kaj interlingvaistoj la lingvo estas ludilo, pupo. Por esperantistoj ĝi estas instrumento, ilo.

La latina idealo tute ne estas moderna idealo. La mondo ne volas lingvon romidan, naturalisman aŭ okcidentaspektan, sed lingvon senesceptan, regulan, logikan, perfekte manipuleblan kaj perfekte funkciantan! Latintipaj gramatiko, neregula, respektive nenia vortfarado, komplikaj fonetiko, aroj de esceptoj, neprecizaj reguloj, ĉio ĉi estas ekmodaĵoj kaj lingva mumismo, kiujn povas plu defendadi nur jen aŭ jen ankoraŭ iu postvivinta okcidentalista aŭ malfrugiinta interlingvaisto, sed neniu serioza interlingvisto.

Okcidentalistoj emas ataki la esperantan afiksantan sistemon. Sed ataki la esperantan vortfaradon estas kvazaŭ ataki la ĉefan aŭ germanan vortfaradon. La tiel nomataj internaciaj, fakte pseudointernacij afiksoj estas adaptitaj al la latina lingvosistemo. Kaj la latina vortfara sistemo altgrade dependas de la latina verbo kaj precipe de ĝiaj supinaj formoj. La esperanta sistemo, kontraŭe, estas tute alia. Tial la latinesistemaj afiksoj estas por ĝi neuzeblaj. Pro tio pravis Zamenhof. Kaj pro tio malpravas Occidental, respektive Inter-

lingua, se ne paroli pri tio, ke la latina sistemo estas nek la sole ebla nek la plej praktika.

Cetere Interlingua kaj Occidental eĉ ne estas memstaraj, aŭtonomaj lingvoj, sed reproduktoj de lingvoj, spegulaĵ bildoj, nuraj palaj kopioj, ĉiam, ĉie kaj en ĉio daŭre dependantaj de la latina originalo kaj klopode zorgantaj, ke ankaŭ ĉiu nova vorto estu el la sama korto. Tamen, eble ĝuste tial, okcidentalistoj kaj interlingvistoj riproĉas al Esperanto ĝiajn regulaĵn finaĵojn. Tiuj riproĉoj ne havas bazon. Ili estas nenio alia ol envio kaj maskita fiaskokonfeso. Ĉar okcidentalistoj kaj interlingvistoj mem ne sukcesis akordigi eĉ pri la finaĵo de la propra idiomtitolo: Interlingue - Interlingua. Feliĉe se -a estas same bona kiel -e, tiam ankaŭ la esperanta -o havas elstaran ŝancon! Cetere ĉiuj okcidentalistaj blekoj pri taŭgeco aŭ maltaŭgeco de tiu aŭ alia esperanta sufikso aŭ finaĵo havas nenion komunan kun serioza lingvistiko: ili estas apenaŭ io pli ol esprimoj de nuraj individuaj kaj personaj ŝatoj kaj malŝatoj. Ĉar ne gravas, ĉu ekzemple pluralon oni formas per -s, -j aŭ -i. Sed gravas, ĉu la koncerna finaĵo respondas al la internaj spirito, karaktero ke stilo de la lingvo!

La plej granda avantaĝo de Esperanto troviĝas ĝuste en ĝia artefariteco. Ĉar se lingvo internacia ne devus esti pli racia, pli normigite, pli senescepte kaj pli regula ol la lingvoj naciaj, tiam ĉi tute ne havus sencon! Bedaŭrinde okcidentalistoj kaj interlingvistoj perfidiĝis la bazajn sciencajn postulojn interlingvistikajn kaj vadis en marĉojn de hazardeco kaj arbitreco. Ili blindiĝis de la fakto, ke ankaŭ tial oni povas konstrui lingvon. Sed la vojo ne necese estas eĉ taŭga vojo. La elekto ne ĉiam estas la plej perfekta elekto. (Ili trovis kaleŝon. Sed aŭtomobilo estas pli bona ol kaleŝo! Memkompreneble, se kelkaj okcidentalistoj kaj interlingvistoj, malgraŭ ĉio, volas revenadi al la neandertalulaj grotoj, mi ne povas malpermesi tion al ili. Tamen, kiom min koncernas, mi preferas la artefaritan "grotton" Empire State Building. Ĉar ĉu okcidentalistoj volas aŭ malvolas, inter Occidental kun Interlingua unuflanke kaj Esperanto aliflanke diasas precize la same abismo, kiu diasas inter la kavernepoka groto kaj la plej granda kaj moderna Novjorka nubgratalo.)

Esperanto estas lingva kemio. Occidental kaj Interlingua estas retrosalto kaj reveno al la mezepoka alkemio kaj al ĝiaj spiritaĵ obskuro, mistikismo, superetiĉoj kaj pseŭdokredado. Occidental kaj Interlingua estas profunde reakciaj, malvaste kaj strikte nur okcidentanaĵ, kaj vole nevole esence antipopolaj, antidemokrataj kaj antisociaj, ĉar ekmodaj, malmodernaj kaj nerepondantaj al la sciencoteknika karaktero de la moderna lingvistiko kaj de la moderna pensado.

Cetere lingvo, ĉiu lingvo estas antaŭ ĉio afero socia, intima afero de la tuta popolo! Nu, estas iom konsterni vidi la absolutan mankon de popolo en ĉiuj paroloj kaj argumentoj okcidentalistaj kaj interlingvistaj. Por ili la popolo ĉel elvaporigiĝis, perdiĝis. Logike kaj nature! Ĉar Interlingua kaj Occidental estas lingvoj sen disĉiploj, tipaj malvermaj laboratoriaj produktoj, post kiuj kaj malantaŭ kiuj staras nenio kaj neniu: krom kelkaj eksperimentistoj kaj provistoj, kiuj hazarde konstruadis kaj knededis ilin. Eble pro tio Interlingua kaj Occidental estas nenio alia ol la plej elstreĉita lingva kastismo. Por tiuj du ne ekzistas ordinarej popolanoj. Por ili la homaron formas nur unu malvasta kasteto: eta elito de sciencistoj: la samaj eksperimentantoj kaj provantoj, kiuj jam staris ĉe iliaj nasko kaj lulilo. Tamen, eĉ tiujn Occidental kaj Interlingua ne sukcesis varbi kaj perevadi. Ĉar ĝuste la elitoj jam antaŭ longe ekkomprenis, ke Occidental kaj Interlingua ne estas progreso, sed retroiro kaj apenaŭ io alia ol paradoksa formo de la plej ruza lingva kaj socia diskrimino. Kaj tial ankaŭ sciencistoj komencas senes-

cepte preferi la scienteknikan lingvan revolucion, kiun reprezentas Esperanto. Ĉar ankaŭ en la interlingvistaj rondoj jam ekklarigas, ke ekzistas nur unu sola alternativo: aŭ Esperanto, aŭ la reveno al la latina! Ne ekzistas alternativo inter Esperanto unuflanke kaj Occidental aŭ Interlingua aliflanke. Ĉar tiuj du elektis falsajn premisojn. Ili forgesis, ke la plej simpla estas la plej genia. Kaj tion, en la vivbatalo, oni pagas tro egkoste: per la perdo de la vivo-ŝanco!

(Mi ne volus fari parabolojn. Sed esperantisto estas homo, fluganta de unu kontinento al la alia per la plej lasttipa, plej rapida kaj plej komforta supermoderna, perfekte artefarita jeto. Okcidentalista (aŭ interlingvaisto) estas homo, malrapide ĝirkaŭrajdanta la tradician, malvastan Mediteraneujon sur malrapida, kaprica kaj tradicia, sed jes ja tute "natura" azeno.) Esperantismo estas scienteknika revolucio kaj progreso. Okcidentalismo estas retropaŝo kaj reveno. Reveno nenien. Falsa kaj pseŭda reveno. Retra iro. Ĉar al la tradicia Mediteraneujo pli konvenus ne Occidental, sed ja la same malnova kaj tradicia lingvo latina, se ne rekte la klasika greka. Sed jen, laŭ Petro Stojan, la mistera serpento Uroboro ekmordiĝis sian voston!

Lasence ĉiu afero juĝas sin mem. Esperantistaj agadoj grandekale disvolviĝas en ĉiuj partoj de la mondo. La esperanta literaturo kreas de horo al horo. Esperanto estas perolata, disaŭdigata, skribata kaj uzata ĉiam, ĉiel kaj ĉie. Occidental kaj Interlingua, kontraŭe, estas apenaŭ io pli ol nuraj mortnaskitaj kabinetaj provoj: lingvoj sen popolo! Sed ĝusta tiukaŭze iliaj postvivintoj kaj gevidvoj tiom bruas kaj kriegas. Kaj jen kial, anstataŭ fosi ĉian sulkon, ili ĵetas ŝtonojn en la najbarajn sulkojn, pruvante tiel, ke ili mem ne havas propran sulkon por fosi. Mi ne scias: eble ili eĉ ne volas fosi, eble ili preferas nur marodi kaj embuski. Kaj, vere, preskaŭ ĉiuj iliaj argumentoj estas profunde snobismaj kaj tipe antisociaj, antipopolaj kaj etburĝaj. Tro ofte ili eĉ ne estas argumentoj, sed simple nur kalumnioj kaj insultoj. Tiel, kutime, kondukta malfortaj, sensignifaj fanataj sektoj kaj fanataj individuoj, kiujn neniu atakultas kaj kiujn neniu prenas en la konsideron. Akuta komplekso de malplivaloreco. Simptomoj: obsedo, furiozo kaj atakoj. Indiko: ignorado kaj neatentado. Esperantistoj tial, ordinare, ne emas zorgi kaj paroli pri ili. De tempo al tempo, kiam iliaj subfosoj fariĝas tro demagogiaj kaj malveraj, ili tamen estas devigataj defendi sin kaj resendadi ilin en iliajn proprajn limojn.

Kvankam, envere, preskaŭ ĉiuj kvereloj kaj disputoj estas nuraj miskomprenoj, devenantaj de tio, ke ankoraŭ ĉiam ekzistas homoj, kiuj ne volas allasi la realon: la angla estas tia, kia ĝi estas; la franca estas tia, kia ĝi estas; kaj, vole nevole, ankaŭ Esperanto estas tia, kia ĝi estas! Tio estas fakto! Kaj oni povas nenion krom akcepti kaj registri ĝin!

Ĉiu perfekta lingvo senĉese ĝiskreskas el interne, konstante ĝi dievolvas sin el siaj propraj fontoj kaj profundoj, ĝi daŭre renoviĝas el ene kiel la fabela Fenikso! Semtempe seninterrompe ĝi inklinaĵas al ĉiam pli kaj pli grandaj koncizoj kaj interna simpleco. Plej klare tiuj tendencoj manifestiĝas en la angla. Tamen kio estas tute natura kaj normala en la angla, tio estas same natura kaj kuranta ankaŭ en Esperanto. La parolantoj, ĉiam kaj ĉie, penas eluzi ĉiun lingveron ĝis maksimumo. Tial el polui ili tiras rekte poluo, kiu estas kaj pli frapa kaj pli konciza ol la komplika kaj ne-logika pollucio. Komprenable en la latina lingvo tiaj senperaj substantivigoj ne ekzistas. Ĉar la latina lingvo, simple, ne povas transalti la supinon. Tial ĝi posedas nenian eblecon eviti la devigan skemon, kiu kondukas de pollucio, ere, lui, lutum ĝis pollutio. Sed kio validas por la latina, tio tute ne validas por Esperanto, kiu estas lingvo de alia, multe pli alta kaj ege pli moderna tipo.



Okcidentalistoj povas miri. Tio tamen neniel ŝanĝos la realon kaj la iron de la faktoj. Ĉiaj limigoj ĉi tie estas absolutaj vanaj. La vivo emas sin promovi. Kaj la principo de neceso kaj sufiĉo estas fera leĝo. Ĝi efikas sendepende de ies ajn individuaj ŝatoj kaj preferoj!

La "internaciaj" vortoj de Occidental kaj Interlingua ne estas internaciaj, sed strikte nur interlatinidaj. Tial ĉiuj okcidentalistaj krioj kaj panikoj pri primitivaj, bizaraj kaj rebusaj<sup>3)</sup> formoj de esperantaj vortoj estas minimume ridindaj kaj mem bizaraj, primitivaj kaj rebusaj. Kaj ili pravas nur, ke ĝis nun okcidentalistoj kaj interlingvaistoj sukcesis ellerni eĉ ne la plej elementan lingvistikan abocion. Internacia idiomato estas eĉ ne tiom demando lingvistika, kiom afero sociologia. Ja ankaŭ la "malkapablo" de la latina ne estas lingvistika, sed sociologia.

Krome la tri infinitivoj de Occidental (amar, vider, finir), komplika fonetiko (c legata jen kiel c, jen kiel k; zz - c; t prononcata jen t, jen ĝ; g sonanta aŭ kiel g, au kiel ĝ, ktp.), neregula akcento kaj aliaj "eltrovoj" estas apenaŭ io pli ol nuraj ekmodaj kapricoj, pagantaj superfluan tributon al la latina.

Esperanto radikale rompis kun ĉiuj ĉi interlingvistikaj superstiĉoj kaj araroj. Ĝi kreis tute novan, multe pli progresivan vortofaran sistemon, absolute regulan, simplan, logikan kaj senesceptan, perfekte sciencan, moderne teknikan, ekskluzive ingenieran kaj ĉiurilate funkcia. Komprenoble ĝi tiel forŝovis la malviglan, pezan, komplikan kaj ne plu modernan sistemon latinan. Sed tio ja estas sekvo de sia revolucio. La manova, aĝa, ne plu funkcia kaj tial ne plu vivkapabla devas cedi sian lokon al la nova, freŝa, senpena, aŭtomata. La tradicia lavistino povas iri ripozi kaj lasi la laboron al moderna lavaŭtomato! Occidental, Interlingua estas la klasikaj, maljunaj kaj ŝvitoplensaj Mediteraneujaj lavistinoj. Esperanto estas brilanta moderna aŭtomato, multe pli efika, multe pli praktika kaj laboranta sur tute aliaj teknikaj kaj sciencaj bazoj kaj principoj. Kaj tial ankaŭ ĝiaj parametroj estas nekompareble pli altaj kaj perfektaj. Occidental, Interlingua estas la tradicia manlaboro. Esperanto estas aŭtomatlaboro! Malgraŭ tio, tamen, Esperanto enhavas pli da vivo kaj elano ol la lingvoj naciaj. La maŝino homiĝis. El la roboto Primo kaj la robotino Helena<sup>4)</sup> fariĝis homa paro. Ili iĝis novaj Eva kaj Adamo. Naŝiĝis la universala lingvo de la sciencetnikaj revolucio kaj epoko, lingvo, kiu malgraŭ tio tamen restis lingvo kun ĉiuj tradiciaj ĉarmoj, ravoj, nuancoj kaj odoroj, lingvo, kiu tamen konservis sian duoblan karakteron sciencetnikan kaj popolan.

La anglan lingvon formas la angle parolantaj gentoj. Sed, paradokse, ankaŭ ĉe la angla ĉiu maljuna maristo kaj ĉiu eluzita havena putino havas la samajn rajtojn kiel ĉiu ajn universitata profesoro. Ĉar nur malofte universitata profesoro sukcesas krei novan, sukan kaj trafan vorton kaj esprimon. Nu, maristoj kaj putinoj kreas ilin ĉiutage. Sed - tio kondukus nin al la demando pri la popola karaktero de lingvoj. Occidental kaj Interlingua ne estas popolaj idiomoj. Sed jes ja Esperanto, kiu aciiis altgrade sciencetnikaj selekti siajn internajn elementojn, kaj samtempe tamen suĉi ĉiujn vivosukojn de la lingvoj naciaj.

Tial - ni plu esperantigadu Esperanton!

#### Notoj:

- 1) Occidental ŝanĝis post la dua mondmilito sian nomon je Interlingue, laŭ proklamo de siaj gvidantoj pro politikaj kaŭzoj. Ili ne deziris Substreki "okcidentecon" de tiu ĉi projekto, ĉar Okcidento fariĝis en burĝa politika slogano simbolo de "libera", "kristana", ktp. Eŭropo, de fakte simbolo de kontraŭkomunisma ideologio.
- 2) -aj : laŭ PIV tekniko, sed fakte komunuze sufikso, ia nepersona

analogio de -ul\* : nubgratalo (nubgrata objekto, domago), krozalo (krozanta objekto, ŝipo), trimastalo (trimasta objekto, ŝipo), katedralo (katedrohava objekto, preĝejo), animalo (io animhava, besto), ktp.

- 3) Fokuso, n-ro 11/73, interlingvistika cirkulero, eldonas E. Vilborg, Akademiano, Göteborg, Svedujo.
- 4) Karel Capek: R U R , Moraviaj Esperanto-pioniroj, Olomouc 1926.

Ohlasy na článek Otázka pro pedagogy

## DŮRAZ NA KONVERZACI

"Je potřebné, aby kurzisti boli rozdelení do viacerých skupín, ak sa nachádzajú v rôznych vekových kategóriách", píše ve svém dopise Jozef Kušnier z Tvrdošína. "V kružku pre začiatčníkov treba vhodne zvolit aj učebnicu. Podľa môjho názoru je kniha Učebnica esperanta (Rosa) alebo Cvičebnice esperanta (Kilian) pre nich náročná. Vhodnejšia se stáva ABC od T. Kiliana resp. Základy esperanta od Tvarožka. Ani tu nie je potrebné, aby sme preberali všetky lekcie - na to ani nie je čas za jeden rok - stačí prebrať gramatiku, aspon po zložené časy - tieto len informatívne. Pritom podstatnú časť venovať konverzácii."

K článku "Otázka pro pedagogy" otištěném ve Startu č. 3 mám tento názor, píše nám Jaroslav Skramský z Poděbrad: Vyučovat podle Kilianovy učebnice. Do vyučování zapojit všechny členy klubu, kteří již sami prošli kurzem esperanta pro začátečníky podle Kilianovy učebnice a kurz alespon z polovičky zvládli úspěšně. Jejich zapojení do vyučování nových kursistů si představuji takto:

Učitel vyloží gramatická pravidla nové lekce a vzorně přečte esperantský text. Potom si kurzisty vezmou na starost jeho "pomocní učitelé", t. j. výše zmínění členové klubu... Pomocníci vyučují tak, že čtou esperantský text česky a kurzisté, kteří mají učebnice zavřené, překládají mluvené slovo z češtiny do esperanta... a tím si navykají na esperantský hovor. Nastává situace, že pomocníci učitele mluví jen česky, zatímco kurzisté hovoří jen esperantsky, což je jisté to nejspřávnější...

Nezáleží jistě na tom, postupuje-li se podle Kilianovy učebnice nebo podle některé jiné dobré učebnice, důležité je, aby ji učitelovi pomocníci dobře znali.

Dopis Jana Novotného z Brna se shoduje s názorem J. Kušnierera v tom, že podle autora "je zbytečné probírat s žáky celou Kilianovu učebnici, poněvadž po dvouletém studiu si nikdo stejně všechna slůvka nezapamatuje ... Kurzy a školení jsou dobré k probírání základů a zvláště pak mluvnice jazyka a dále ke konverzací, aby se žák naučil rozumět textu nejen tištěnému, ale i slyšenému. K této účelům by měl jeden rok stačit. Ostatek je tak jako tak otázkou samostudia".

A ještě několik slov z dopisu Eli Urbánové z Prahy: Bylo by opravdu užitečné dát hlavy dohromady a vyměnit si zkušenosti s vyučováním esperanta. Za schůzku učitelů esperanta se přimlouvá i pan V. Rotrekl, Palackého 15, 669 00 Znojmo, který mě ve svém dopise žádá o radu, jak zabránit fluktuaci dětí.

Tolik naši pedagogové. Věříme, že na jejich názory budou reagovat další a že již brzy budeme moci oznámit konkrétní výsledky diskuse.

Rozhovor s národním umělcem Karlem Högerem

## ZŮSTALI JSME MU VĚRNÍ...

(Intervjuo kun Karel Höger, Nacia Artisto de ĈSSR, pri Esperanto)

Mistře, slyšela jsem, že jste kdysi pracoval v brněnském rozhlasu, v tak zvané Verda stacio - stanici, která vysílala v mezinárodní řeči esperantu. Mohl byste říci, co jste vysílali a jakou mělo esperantské vysílání odezvu ve světě?

Ano, ještě když jsem byl v Brně, vytvořili jsme tam pravidelné pořady "Verda stacio" vysílané v esperantu. Tato "zelená stanice" měla prokázat praktickou a uměleckou platnost esperanta a skutečně se nám to vedlo. Byli jsme jediní profesionální herci, František Kožík, Zdenka Švabíková, já, Vladimír Leraus, Antonín Klimeš a několik ostatních. Na pořadu jsme měli repertoár umělecky hodnotný: Čapkovu Bílou nemoc, O'Neilovu Framu pod jilmy. Se Zdenkou Procházkovou jsem jezdil po esperantských klubech, hráli jsme dueta Rossalindy a Orlenda ze Shakespearovy hry Jak se vám líbí, Kázání studenta z Mahenova Jánošíka, recitovali Erbenovu Kytici a různé skeče, které psal Kožík, Chalupa a režisoval Bezdiček. Ale byli jsme nejen činoherní činní. Členové opery Zemského divadla za doprovodu operního orchestru provedli například celou Prodanou nevěstu. Mělo to ohromnou odezvu, byli jsme prakticky známí po celém esperantském světě, snad právě proto, že naše vysílání, na rozdíl od jiných, mělo vysokou uměleckou úroveň. Ozvali se nám i esperantisté z Afriky i z Grónska. I když z nás většina odešla k divadlu do Prahy, znamená Verda stacio mezník v rozšíření esperanta. Brno bylo tehdy "hlavním městem" esperanta.

Od té doby uběhla řada let. I když jste byl jako jeden z našich nejoblíbenějších herců stále nesmírně zaneprázdněn a na esperanto Vám pochopitelně nezbyvalo času, doufám, že esperanto neztratilo Vaše sympatie?

Činnost v oblasti esperanta byla spojena s mým i naším mládím, měli jsme je rádi a zůstali jsme mu věrní, i když jsme se mu nemohli prakticky širěji věnovat jako za růžových dnů brněnských. Povím Vám však jednu zajímavou drobnost. Když jsem byl před časem v Bulharsku, viděl jsem, že pokladník v lázních měl v klopě kabátu zelenou esperantskou hvězdičku. Vzpomínáje na "Verda stacio", oslovil jsem ho esperantsky. Měl takovou radost, že mae pak stále pouštěl na pláž zdarma.

Myslíte, vážený mistře, že by bylo užitečné vysílání v esperantu obnovit? Podle mého názoru bychom si měli vzít příklad z Varšavy, kde se vysílá třikrát denně po 30 minutách.

O tom nepochybuj. Avŝak neobnovit jen esperanteké zpravodajství, ale i kulturní pořady, jak jame to kdysi dělávali my v Brně. Jako herec dobře vím, že je možno esperantsky vyjádřit všechny emoce, všechny citové polohy, počínajíc četbou a končíc hrou, dramaty, konverzačkami. A esperanteké písně, songy, miniopery i operety by jistě šly kolem světa. A našlo by se jistě i hodně našich herců - náleedníků.

RoZmlouvala E. Urbanová

## •••• *Rondvojaĝo tra Pollando* ••••

Jam pasintjare ĈEA envicigis en sian agad-planon por 1975 kelkajn ekskursojn eksterlanden por siaj membroj. Ĝia turisma komisiono preparis autoĉaran rond-vojaĝon tra Pollando sub la gvido de L. Křivánek el Písek.

Malgrau diversaj malfacilaĵoj la vojaĝo efektiviĝis kaj la vojaĝ-programo estis plenumita centprocente, ofte dank al oferemaj kaj helpemaj polaj esperantistoj. La plej valoran helpon donis St. Gonczarek el Szczecin (kiu akompanis la grupon dum tu ĉagoj), A. M. Krajewaka el Koszalin (dum eksterordinara halto ŝi sukcesie tie rapidege prizorgi bonan tranakton), la Esperanto-Klubo en Olsztyn (kiu amase bonvenigis la grupon en la urbo kaj preparis solenan bankedon kun programo), Z. Stawikowski el Białyostok (ofereme kunvojaĝis longegan distancon de Olsztyn tra Białyostok ĝis Varsovio) kaj St. Jaroszowa el Krakovo (perfekte prizorgis administrajn aferojn kaj loĝigon en sia urbo).

Bedaŭrinde, du urboj - nome Gdańsk kaj Varsovio - elmeritis malbonan reputaciop. Fine tamen la sekretariino de la filio de PEA en Gdańsk trovis taĝan tranaktojon, almenaŭ por la pli aĝaj gastoj. En Varsovio ni bedaŭrinde eĉ tian tranaktojon ne trovis.

Feliĉe, dum la tuta ekskurso regis belega vetero. Plurfoje eblis agrable sin bani en la maro, sed la plej ĉarmaj estis la lagoj Mazury kun siaj naturaj sablaj strandoj, kristalpuraj akvoj, pli varma ol tiu de la sudbohemiaj fiŝlagoj. Kiel la plej interesaj vidindaĵoj montriĝis la insuloj Wolin kaj Uznam, la vilaĝeto Trzask (kun ruino de mezepoka preĝejo sur abruptega sablo-monto, kies parton forrabis mar-ondegoj), la duoninsulo Hel (30 km longa, sed nur 200m ĝis 2 km larĝa), ŝipveturo tra la haveno Gdańsk al la monumento de la kontraŭnazia batalo en Westerplatte), la famaga kastelo de la kruc-kavaliroj Malbork, Wolfschanze, la iama sekreta kaŝejo de Hitler, la bela kaj gastama urbo Olsztyn, la naŝkigrubo de L. L. Zamenhof Białyostok kaj lia tombo en Varsovio, la historia urbo Krakovo, la mond fama sal-minejo en Wieliczka kaj fine kortuŝaj dokumentoj en la nazie koncentrejo Oswiecim.

Tiuj partoprenantoj, kiuj jam plurfoje vizitis Pollandon, ege admiris, kiel dum la lastaj jaroj disfloris tiu ĉi lando, tiom profunde detruita dum ambaŭ mondmilitoj. Sufiĉis nur tri jardekoj de paca konstruado por krei landon ekonomie kaj kulture altrangan. Kaj ĉiuj konstetis, ke el turisma vidpunkto ĝi estas lando tre interesa.

(lk)

\* \* \*

Forpasis la 18an de aŭg. post longa malsano, aĝe 39 jarojn, Jan Tichý, instruisto en Moravský Karlov, fervora pedagogo en SET Lančov.

Tragike mortis la 31. 7. en Alpoj ing. Zdeněk Nevdšil - mal el Praha.

Honoron al ilia memoro!

M. ŠVANDRLÍK

## TROVO DE VALENTIN KROCÁNEK

"Kial vi, Krocánek, ne preferis labori en la poŝto?" tondris la estro de la morala sekcio, subkolonelo Plíšek. "Dum la tuta tempo, dum kiu vi laboras tie ĉi, vi nenion sukcesis malkovri! Valenta malkovris la projekciejon de pornografiaj filmoj, Šošolák kaptis la prostituan pensiulon Slejška, Tintěra atentigis pri frivolulo, kiu fotografas nudajn virinojn kaj Fouseček sekvas la aferon de frivolaĵ orgioj en Slivenec. Nur vi, Krocánek, ricevas salajron, sen redoni al la ŝtato ian kompensan laboron. Mi admonas vin, Krocánek, vi finiĝos kiel gardisto de stratsemaforoj kaj vi ankoraŭ estos kontenta!"

La serĝento Valentin Krocánek aŭskultis la kruelajn vortojn kun klinita kapo kaj konsciis, ke ili estas nepre pravaj. Lia certa detektiva talento fakte ankoraŭ ne montriĝis, kvankam strebado kaj bonvolo nepre ne mankis. Sed la detektivo bezonas ankaŭ bonŝancon kaj tiu ĉe Krocánek en la lasta tempo mankis. Kaj krome estis tie ĉi nekonata orhara junulino, kiun li de tempo al tempo vidadas preteriri la gastejon, en kiu li ruze exploreerĉis iajn fiagojn. Krocánek ja ne kuraĝas alperoli la belulinon, ĉar li estas homo timema. Sed tio neniel influas la fakton, ke en lia kapo estas nur orhara belulinino.

Ankaŭ hodiaŭ Krocánek celis en la gastejon "Ĉe nigra sandro". Li mendis bieron kaj konverseciis kun kunsidantoj. La temo estis konstruado de domaroj kaj li en la konversacio kaŝe menciis pri preteco aĉeti pornografiajn presaĵojn. Unu el gastoj diris, ke li ne posedas tiajn presaĵojn, sed ke li volas vendi por bona prezo duonnovan gasradiatoron. Krocánek grumblis ion malefablan kaj travidis ĉagrene la fenestron. Kaj jen li ekvidis ŝin. Ĉarma orharulino memfide paŝis al la parko.

"Valentin, jen vi estu pruvonta, ke vi estas viro!" diris Krocánek por si kaj forlasis decidoplene la gastejon. Kiel sperta detektivo li kaŝe sekvis la junulinon al la parko. Li esperis, ke ŝi tie ekvidos sur benketo kaj li sukcesos ekdialogi kun ŝi. La junulino malrapide ondumis sur la vojeto surŝutita per sablo kaj eĉ ne pripensis, ke ŝi estas sekvata. Krocánek senĉese proksimiĝis, ĉajniĝante sprite, ke li interesiĝas pri pensiulinoj, kiuj tie manĝigis krestalaŭdojn.

En momento, kiam li estis de la junulino apenaŭ dek metrojn, li

ja rimarkis elegantan viron mezeĝan, kiu jam de malproksime ridetis al la orharulino. Li kaj ŝi malrapidigis paŝojn kaj Krocánek fariĝis atentema. Li malplezure konstatis, ke ĵaluzaj sentoj ekokupas lin. Kio estas komuna al lia belulino kun tiu elegantulo?

"Bonan tagon, fraŭlino Vladěna" salutis la viro "Ĉu vi iras en la entreprenon?" - La orharulino kapjeesis: "Kiam ni povas atendi vin, sinjoro René?" ŝi demandia. La elegantulo momenton ekpensis. "Sendube vendrede" li diris poste. "Sed mi ankoraŭ telefonos al sinjorino Kamila. Kaj mi deziras senkondiĉe vin." - "Memkompreneble, sinjoro René" ridetis la fraŭlino. Ŝi mansignis leĝere al la elegantulo kaj atentante ĉiun sian paŝon ŝi daŭrigis la iron. Kontraŭe sinjoro René reatis stari kaj longe rigardis post ŝi kun nekaŝita admiro.

Nek unu nek la alia estis forgesita de Krocánek, en kies kapo ja estis perfekta konfuzo. En kiun entreprenon celas lia belulino? Ĉu ŝi estas frizistino aŭ kelnerino, ĉu manekeno?

Krocánek refoje kaŝe sekvis la fraŭlinon Vladěna. Li rezignis ja pri la intenco alparoli ŝin, sed li decidis esplori la lokon de ŝia laboro. Poste li povos pli bone utiligi okazon por konatiĝi. Se tiu junulino priservas sinjoron René, kial ŝi ne priservas je Valentin Krocánek?

La junulino eliris el la parko kaj iris rekte al granda vilao kun ĝardeno. Antaŭ ol Krocánek alvenis, ŝi malaperis en la pordo. La detektivo malfermis sian buŝon pro surprizo. Kia entrepreno tio povas esti? Vilao, eĉ se ĝi estas grandspaca kaj parada, aspektas tute certe kiel familia domo. Neniu pendas firmao aŭ io simila. Kiaj servoj povas tie prezentataj al la publiko? Ĉu tie estus iu sekreta privata entrepreno? Krocánek tute embarasita nerveze retretis antaŭ la enirpordo kaj esploris la situacion rigardante en kurtenfermitajn fenestrojn. Sed neniu bona ideo venis al li. Tamen poste li venkis sian denaskan hezitemon kaj sonorigis. Li mem ektimis pro sia ago, li temen kuraĝigis kaj ne forkuris. Post momento de atendado eliris iom aĝa eleganta virino.

"Ĉu la sinjoro deziras ion?" ŝi demandis ekre. - "Mi ..." balbutis Krocánek "nome ... min sendas sinjoro René." La vizaĝo de la sinjorino ŝanĝiĝis. En ĝi aperis ĉarma komerca rideto. "Do kliento" ŝi diris ridetante. "Mi supozas, ke vi ankoraŭ ne estis ĉe ni!" - "Ne, mi ne estis" allasis Krocánek "sed sinjoro René ..." - "Memkompreneble" jesis la sinjorino "la rekomendo de sinjoro René estas por

ni granda honoro kaj devoligo. Mi estas Kamila." - "Valentin" prezentis sin Krocánek kun haka komplimento. - "Bonvolu ja eniri, sinjoro Valentin" ridetis la sinjorino kaj eniris antaŭ li la vileon. "Ĝus antaŭ momento venis fraŭlino Vladěna, kiun speciale deziras sinjoro René. Ankoraŭ estas tie ĉi fraŭlino, Sonja kaj Aglaja." - "Mi petus fraŭlinon Vladěna" diris la detektivo kaj sekvis sinjorinon Kamila, kiu kondukis lin en negrandan ĉambron, kiu aspektis kiel sporta vestejo. "Ĉu vi ĝuas la saman specon de masaĝo kiel sinjoro René?" demandis sinjorino Kamila.

Fine, ĝi estis malkovrita. Sinjorino Kamila estas estrino de ia masaĝa saloneto kaj fraŭlino Vladěna laboras tie kiel masaĝistino. La problemo estas solvita. - "Jes, mi petas" diris Krocánek "mi ĝuas la saman kiel sinjoro René." - "Bonvolu tie ĉi senvestigi vin" ridetis sinjorino Kamila "kaj poste metu vin tien ĉi". Ŝi montris ion sur radoj, kio tre aspektis kiel operacia ĉareto. Krocánek embarasplene restretis, ĉar li la interkonatiĝon kun la ĉarma fraŭlino Vladěna alie imagis. Li nepre sentis kiel mankon, ke dum la unua rendezuo li estu sen vesto. Alie li ja komprenis, ke oni kutime ne estas masaĝata en vesto. Cetera masaĝistino estas preskaŭ kvazaŭ kuraĉistino. - "Vi certe estos kontenta, sinjoro Valentin" asertis la sinjorino kaj Krocánek heziteme komencis senvestigi sin. Kiam li, streĉante ĉiujn fortojn, finis sian striptizon, li obeis metis sin sur preparitan ĉareton. Li vidis sin kiel bebbon fotografistan dum paŝtado de ŝevaletoj.

Poste venis plua nekutima afero. Sinjorino Kamila kun nekutima rutino alligis la detektivon per pluraj rimenoj al la ĉareto tiel perfekta, ke li eĉ ne povis moviĝi. Poste ŝi puŝis la ĉareton kaj movis ĝin ien kiel kelnerino en unuaranga restoracio por disporti menuon al gastoj. Krocánek komencis esti tre nervoza, ĉar detektivo estu agema kaj li apenaŭ povas movi sian halukeon. Kia stranga masaĝo estos? Sur la frunto de Krocánek aperis ŝvitgutoj, kiam li ekpensis, ke en tiu ĉi situacio vidus lin lia granda ĉefo. Sinjorino Kamila puŝis la ĉareton kun nuda detektivo tra longa koridoro kaj enŝovis ĝin poste en saloneton, kie hegemoniis malhelruĝaj veluraj kurtenoj. La ejo sen taga lumo estis lumigata de verdaj kaj ruĝaj lampoj.

Krocánek provis almenaŭ iomete levi sian kapon kaj en tiu momento li ekvidis fraŭlinon Vladěna. Ŝi staris en la mezo de la ĉambro en nigra surkorpa trikoto kaj tenis skurĝon en sia mano. Krocánek terurigite malfermegis la okulojn kaj balbutis ion. Sed la orha-

# INFORMACE SEKRETARIÁTU ČES

INFLAČNÍ TLAK ZE ZÁPADU DOLĚHÁ I NA NÁŠ SVAZ!

Není třeba opakovat, že ceny v západním světě rostou inflační křivkou. Proto členské příspěvky, které platíme UEA, se za poslední dva roky zvýšily o plných 100 %. Jde o kolektivní členství svazu, které nám dává právo zasedat ve výboru UEA, hlasovat a spolurozhodovat. Ještě předloni jsme platili za jednoho člana pouze polovinu dnešní sumy. Letos musíme zaplatit na příspěvcích 21 000 Kčs. Je to částka tak obrovská, že pohltí téměř jednu třetinu veškerých členských příspěvků. Stojíme nyní před vážným rozhodnutím: buďto rezignovat na členství v UEA (a to by zřejmě nebyl vhodný krok) anebo získat krytí na tyto zvýšené příspěvky. Bylo navrženo, aby se při vybírání členských příspěvků u kategorie A+B inkasoval obnos, který by pokryl tento schodek. Jde o 7 Kčs u kategorie A a 5 Kčs u kategorie B. Zvažte důvody, proč jsme nuceni požadovat tento příspěvek a pomozte řešit finanční obtíže svazu, ale hlavně UEA!

D A R Y Z A S R P E N . B. Uher, Brno - 20 Kčs, M. Tyrala, Nový Jičín - 10, J. Vydra, Ostrava - 20, J. Sebel, Třebíč - 9, J. Hošek, Ostrov - 20, D. Jaroslav, Pustějov - 21, Z. Jonáš, Mladá Boleslav - 30, J. Nedoma, Klatovy - 40. S. Stefan - 20.

---

rulino jam alpaĝis la ĉareton kaj komencis fervore vipi la detektivon sur nuda postajo. Krocánek terure ekkriegis kaj tra la saloneto aŭdiĝis korrompa malespera plorblekado, kian tie vandoj certe ankoraŭ ne aŭdis. Kaj la pluvego da bone lokitaj vipofrapoj daŭris. La plorblekado de Krocánek inspiris fraŭlinon Vladěna al perfekta laboro.

"Krocánek" diris post kelkaj tagoj la subkolonelo "mi ĉiam iomete subtaksis vin, sed kiom vi sukcesis, tio nepre estos en la historio de nia kriminalistiko. La trovo de sadiama orgiejo en la centro mem de Praha, tio estas sukceso! Oni vidas, ke vi estas talenta kaj ĝuste prijuĝanta. Mi profetas al vi, Krocánek, ke vin atendas granda estonteco!"

Valentin Krocánek akceptis tiun ĉi laŭdon kun miksitaj sentoj. Unue li malĝojis, ke lia bela nekonatulinino estos malliberigita kaj due li konsciis, ke li ankoraŭ dum multaj tagoj ne povos sendolore sidi.

El la kolekto Bofrato de Drakula

Tradukis Josef Chvosta

---

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1, tel. 220 262. Aperas sesfoje jare. Redaktas Oldřich Kníchal kun red. komitato: dr. Jaromír Jermář, Jaroslav Mařík kaj inĝ. František Sviták. Teknika prilaboro: V. Kočvara. Tajpis K. Onderová. - Dohl. pošta Praha 07, sniĝ. pošt. poplatek pov. RP Praha j. z. P/1 - 2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 28. října 1975.